



Diamanto sur marta neĝo

Sur neĝamas' briletas
lumklara diamant'.
Neniu larm' aŭ perlo
egalas al l'flagrant'.

Sekretan sunsopiron
reflektas tiel ŝi.
Sin turnas al la suno
dum iras supren ĝi.

Ĉe fin' de l'sunradio
petanta staras ŝi
kaj kisas ĝin en amo;
degele larmas ŝi.

Ho, kiel dolĉe ami
plejaltan en la viv',
rebrili ĝian lumon,
morti en ĝia sin'!

J.J. Wecksell

Josef Julius Wecksell (Turku 1838 – Helsinki 1907)
estis poeto kaj dramisto. Malgraŭ lia bedaŭrinde mallonga
krea periodo (ĝis 1865, de kiam grava psikoza kovris lian vivon)
li restas inter la plej elstaraj en la Finnlanda svedlingva literaturo.
Vizitantoj en *Turku* salutu lian statuon ĉe la biblioteko de *Åbo Akademi*,
malantaŭ la katedralo.

La plej konataj verkoj de Wecksell sendube estas la tragedio *Daniel Hjorth*
kaj la poemo *Demanten på marssnön*, kiu komponita de *Jean Sibelius*
fariĝis granda klasikajo. Jen mi provis redoni ĝin esperante antaŭ niaj martaj
vintraj tagoj. Por lernmemori la melodion kaj kunkanti, aŭskultu la svedan
kantistinon *Birgit Nilsson* ĉe www.youtube.com/watch?v=BlvrtVHxS7c

tg



Epäonnistuiko esperanto? p. 4–5

- ♦ Vintraj Tagoj – Talvipäivät 16.–17.3.2013, p. 10
- ♦ Mondlingvoj forpasas kaj venas, p. 15

ESPERANTOLEHTI

Esperanta Finnlando ♦ Esperantobladet

ISSN: 0787-8206

Kielipoliittinen kulttuurilehti. Suomen Esperantoliitto ry:n äänenkannattaja.
Språkpolitisk kulturtidskrift. Organ för Esperantoförbundet i Finland.
Kultura periodaĵo lingvopolitika. Organo de Esperanto-Asocio de Finnlando.
Perustettu/Grundad/Fondita 1918. Esperantolehti ekde/från 1989 lähtien.
Esperanta Finnlando 1918–23, 1948–53, 1959–1987.
Ilmestyy viisi kertaa vuodessa. Utkommer fem gånger i året. Aperas kvinfoje jare.

Toimitusryhmä/Redaktionsgrupp/Redakta grupo: ✉ eafgazeto@esperanto.fi
Päätoimittaja/Chefredaktör/Ĉefredaktoro: *Robert Bogenschneider*
Rusthollintie 6 C 10, 28430 Pori ✉ robog@gmx.de
Taitto/Layout/Enpaĝigo: *Maj-Lis Krouvi* ✉ maj-lis@maisanpaja.info
Vastaava toimittaja/Ansvarig redaktör/Respondeca redaktoro: *Tuomo Grundström*

Tilauhinta/Prenumerationspris/Abonprezo: 24 e/vuosi/år/jaro
Jäsenhinnat: katso jäsenjärjestöt-sivu/ Por membroj: rigardu antaŭlastan paĝon

Tilaukset, osoitteenmuutokset/Abonoj, adressanĝoj:
Suomen Esperantoliitto, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.
☎ 044 2642 742 ✉ eaf@esperanto.fi

Prenumerationer, adressförändringar: EAF, Broholmmsgatan 15 C 65, 00530 Helsingfors.
Pankkitili/Bankkonto: FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Danske Bank 800017-230825).

Julkaisija/Utgivare/Eldonanto: Suomen Esperantoliitto ry – Esperanto-Asocio de Finnlando.
Painosmäärä/Upplaga/Eldonkvanto: 330
Kannen taustakuva: *Maj-Lis Krouvi, 2012*

Esperanto-Asocio de Finnlando ♦ Suomen Esperantoliitto ry

Fondita/Perustettu/Grundad: 1907

Prezidanto/Puheenjohtaja/Ordförande: *Tuomo Grundström*
Anundilankatu 3, 26100 Rauma. ☎ 0440 199 766 ✉ eafprezidanto@esperanto.fi

Vicprezidanto/Varapuheenjohtaja/Vice ordförande: *Päivi Saarinen*
Ruorimiehenkatu 5 C 23, 02320 Espoo. ☎ (09) 813 3217 ✉ paivi.saarinen@iki.fi

Sekretario/Sihtööri/Sekreterare: *Tiina Oittinen*
Puutarhakatu 26 A 11, 20100 Turku. ☎ (02) 230 5319 ✉ eafsekretario@esperanto.fi

Aliaj estraranoj / Hallituksen muut jäsenet / Övriga styrelsemedlemmar:

Tiina Kosunen, Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ 09 813 3024, tiina.kosunen945@gmail.com
Paula Niinikorpi, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 527 4821 ✉ paula.niinikorpi@gmail.com
Jukka Nikoskelainen, Pohjolankatu 11, 20100 Turku. ☎ 050 525 3745 ✉ juknik@utu.fi
Keith (Keke) Uber, Poutapolku 3 B 30, 02110 Espoo. ☎ 040 413 4252 ✉ keith_uber@yahoo.com

Vicestraranoj/Varajäsenet/Suppleanter:

Tapani Aarne, Epilänkatu 41 E 7, 33270 Tampere. ☎ 050 5245 823 ✉ tapani.aarne@mbnet.fi
Robert Bogenschneider, Rusthollintie 6 as. 10, 28430 Pori. ☎ 040 352 4685 ✉ robog@gmx.de
Börje Eriksson, Erkontie 24 C 11, 16300 Orimattila. ☎ 040 779 3487 ✉ esperarto@phnet.fi

Kasisto/Rahastonhoitaja/Kassör: *Tiina Kosunen*

Viittakorpi 2 D 22, 02280 Espoo. ☎ (09) 813 3024 ✉ eafkasisto@esperanto.fi
Pankkitili/Bankkonto (EAF): FI11 8000 1700 2308 25 DABAFIHH (Danske Bank 800017-230825).

Peranto de UEA / Maksut UEA:lle / Betalningar till UEA:

FI66 8000 2005 9953 69 DABAFIHH (Danske Bank 800020-5995369) (UEA/EAF Päivi Saarinen)
Adreso ĉe la EAF-oficejo. / Käytä Suomen Esperantoliiton toimiston osoitetta.

Officejo/Toimisto/Kontor: Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, avoinna tiistaisin klo 17–19.
☎ 044 2642 742 (puh.vastaaaja/respondilo). Malfermita: marde 17–19-a horo ✉ eaf@esperanto.fi

Internet: www.esperanto.fi ♦ www.facebook.com/Finnlando ♦ Twitter: @finnlando aŭ twitter.com/#!/finnlando

Antaŭ nur ok jardekoj

Mallonge antaŭ la apero de ĉi tiu numero pasis okdek jaroj post kiam la tiama Germana prezidento *Paul von Hindenburg* nomumis *Adolf Hitler* kiel registaran kancelieron la 30-an de januaro 1933. La nazia partio ĝuste tiam ne havis sian kulminon de parlamenta subteno – fakto, kiun oni ofte preteratentas. Pli grandan parlamentan grupon NSDAP havis post la elektoj la 31-an de julio 1932; la tiam formita registaro malhavis parlamentan plimulton, rezignis kaj novaj elektoj estis la 6-an de novembro. La nazioj perdis 34 deputitojn, restis tamen la plej granda parlamenta forto kun triono de la voĉoj. Sekvis periodo de traktadoj inter la parlamentaj fortoj, dum daŭris eksterparlamente provokoj kaj bataloj inter ekstremistoj kaj, kio plej gravas kiel katalizilo de la nazia kapto de la ŝtata povo, ekonomia mizero kaj ĝenerala malstabileco de vivo trafinta la plejmulton de la popolo. En tiu situacio la prezidento, la konstitucia nomumanto de la registaro, cedis la kancelierecon al politikisto promesanta ordon. Tre baldaŭ ordo vere estis starigita: La 5-an de marto estis novaj elektoj sub kondiĉoj de “ŝtatdefenda dekreto” kiun la prezidento sub premo donis, NSDAP gajnis 44 procentojn – tamen ne la absolutan plimulton. Aresto de opozicianoj solvis tion, kaj la 23-an de marto la registaro uzurpis al si la tutan povon. Kiam prezidento von Hindenburg sekvajare mortis, la registaro nuligis la prezidentan oficon kaj Hitler kombinis al si la tutan ŝtatan povon de “Gvidanto”. Kaj restarigis or-

don! Tiel bonan ordon, ke li sukcesis en dekdu jaroj konduki la ŝtaton tra milito al pereco.

Ni scias, kiajn sekvojn la nazia ordo portis al la esperantistoj, same kiel al ĉiuj movadoj kun internaciaj aspiroj pri interhoma harmonia kunlaboro en egaleco. En la dudekaj jaroj Esperanto estis aparte forte disvastigita ĝuste en Germanio – kaj en Sovetunio. En ambaŭ la sorto de aktivaj esperantistoj estis en la tridekaj jaroj esti subpremataj de aŭtokrataj, totalismaj ŝtataj sistemoj. Pri la neniigo de la movado en Sovetio legu aliloke en ĉi tiu numero. Vaste traktas la persekutojn kontraŭ esperantistoj la bonega verko de *Ulrich Lins*, “La danĝera lingvo”. – Diktaturoj kapablas krei portempan ordon, eĉ ŝajnajn sukcesojn – sed ne al ĉiuj! – ĉiam kun prezo de perdo de ne nur homoj, sed ankaŭ de la domo.

Ni estas movado por libereco kaj egaleco en internacia komunikado. Tio nepre bezonas kiel kreskejon liberecon kaj egalecon civitanan, kulturalan kaj ankaŭ materialan. Homoj ne estas samaj, similaj, ili emas kaj atingas diference, sed ĉiu havas sian unikan individuan valoron (estas bildo de Dio, se preferi tiel diri). Nia neŭtraleco ne ekskludas, sed necesigas tiun bazan ideon.

Tuomo Grundström



HONORE AL NINO RUNEBERG, LA UNUA PREZIDANTO DE EAF
kaj subtene al la asocio
ALIĜU AL SOCIETO NINO RUNEBERG
pagante duoblan individuan membrecon
...kaj vi renkontos Nino en la Vintraj Tagoj en Helsinki...

Epäonnistuiko esperanto?

(la finlingva resumo de la prelego "Ĉu Esperanto malsukcesis?", bv. vidi p. 15)

Jos esperantoa tarkastellaan pelkästään kielenä, sen ei voi sanoa epäonnistuneen – pikemminkin kyse on erikoisesta ja ainutlaatuisesta menestystarinasta. Kielellä, jolla 125 vuotta sitten ei ollut yhtään puhujaa, on nyt ainakin kymmeniä tuhansia aktiivikäyttäjiä ja jopa tuhatkunta äidinkielistä puhujaa, oma kirjallisuus ja oma erikoislaatuinen puheyhteisönsä. Esperanton puhujien määrä ei näytä olevan laskussa, vaan pikemminkin se on pysynyt samalla tasolla ainakin toisesta maailmansodasta, ellei jo ensimmäisestä maailmansodasta lähtien. Matkustamisen lisääntyminen, radiolähetykset ja viime vuosikymmeninä internet ovat yhtenäistäneet kielenkäyttöä.

Esperantoliike on sitten eri asia kuin esperanton puheyhteisö, samalla tavoin kuin Suomen kansallisvaltio on eri asia kuin suomen kielen puheyhteisö. Esperantoliikkeen voisi moni sanoa epäonnistuneen täydellisesti. Esperantosta piti tulla kaikkien ihmisten toinen kieli, joka syrjäyttämättä heidän äidinkieliään toimisi kansainvälisen yhteydenpidon helppona ja tasa-arvoisena välineenä. Nyt tähän yhteiskielen eli lingua francan tehtävään on vakiintunut englantti, vaikkei suinkaan sen vuoksi, että se olisi kaikissa tilanteissa tasa-arvoinen ratkaisu.

Esperanton synnyn historiallinen konteksti oli maailmanlaajuisten talouden ja politiikan verkostojen synty imperialistisella 1800-luvulla. Aatteellisesti varhaisessa esperantoliikkeessä yhdistyivät pasifismi, maailmanrauhan tukeminen ihmisten suorien kontaktien avulla, ja rationalismi – usko siihen, että myös kysymyksen kansainvälisestä kielestä ihmiskunta ratkaisee lopulta järkipäisin argumentein, ei totunnaisten tapojen tai vahvemman oikeuden perusteella.

Arvostetuimmat kansainväliset kielet esperanton synnyn aikoihin olivat latina ja ranska,

ja niiden vaikutus näkyy esperantossa. Mutta esperantoliikkeessä katsottiin, että kumpikin oli liian vaikea oppia tullakseen jokaisen toiseksi kieleksi, ja sitä paitsi ranskan – niin kuin saksan tai englanninkin – leviämisen ylittämättömänä esteenä näytti olevan se, etteivät kilpailevat suurvallat koskaan suostuisi antamaan yhdelle valtiolle kielellistä etulyöntiasemaa.

1800-luvun vakaalta näyttänyt maailmanjärjestys hajosi 1900-luvun maailmansotien, vallankumousten, kansanmurhien ja siirtomaitten itsenäistymisen myötä. Tapahtui se, mitä esperantistit eivät pitäneet mahdollisena: kaksi suurvaltaa, vähitellen heikkenevä Britannia ja nopeasti nouseva Yhdysvallat, nousivat niin hallitsevaan asemaan, että niiden kieli alettiin hyväksyä maailman yleiskieleksi siitä huolimatta, että ratkaisu antoi äidinkielisille puhujille ansaitsematonta etua.

Esperantoliike ei myöskään ollut ottanut huomioon yhtä seikkaa: yhteiskielen helppous ja puolueettomuus eivät ole kovin tärkeitä ominaisuuksia silloin, jos kieltä on tarkoitus käyttää suhteellisen yksinkertaisella tasolla ja jos tietoa ja kulttuuria on tarkoitus kuluttaa, ei tuottaa. Suomalainen nuori, joka netissä keskustelee englanniksi kaikenmaalaisten tuttujensa kanssa ja kuluttaa englanninkielistä populaarikulttuuria, ei pahemmin kärsi siitä, ettei hän osaa käyttää englantia läheskään äidinkiellisen veroisesti. Englantia ei ole yhtä helppo oppia kuin esperantoa, mutta englanniksi on saatavissa niin paljon enemmän tietoa ja kulttuuria, että nämä esperanton etu jää teoreettiseksi.

Saavutetun aseman antama etu selittää, miksei esperantosta ole ollut kilpailijaksi englannille, mutta se selittää toisaalta senkin, mikseivät muut esperanton kilpailijoiksi tehdyt kielet (esimerkiksi ido tai interlingua) ole syrjäyttäneet esperantoa. Kieleen ehdotetut rakenteelliset pa-

rannukset eivät paljon paina, jos esperanton puheyhteisön ja kirjallisuuden veroinen kulttuuri pitäisi rakentaa jälleen uudestaan nollasta alkaen. Esperanto ei ollut ensimmäinen eikä viimeinen suunnitelmakieli, eikä sen rakenne ole mitenkään täydellinen, mutta se oli ensimmäinen suunnitelmakieli, jolla oli luonnollisen kielen kaltainen rakenne, niin että sitä saattoi todella ruveta puhumaan. Tätä sen historiallista etulyöntiasemaa eivät muut kieliprojektit ole pystyneet horjuttamaan.

Esperantoliikkeen ajatus siitä, että yhteiskielen pitäisi olla helppo ja puolueeton, ei voi sinänsä olla harhainen, koska näitä argumentteja käytetään nykyään usein myös englannin käytökelpoisuutta perusteltaessa. Englannin kirjoitusjärjestelmä ei ehkä ole helppo, mutta aina se kiinan voittaa, ja peruskieliopin tasolla englanti sattuu olemaan varsin helppo kieli – vaikeudet tulevat esiin vasta vaativammassa kielenkäy-

tössä. Ja usein korostetaan sitä, että englannin käyttö vaikkapa japanilaisten ja arabien kohdalla, tai jopa suomalaisten ja ruotsalaisten välisessä viestinnässä, on puolueetonta, kun kumpikaan osapuoli ei pääse puhumaan äidinkieltään. Suomalaisten ja yhdysvaltalaisien viestintään tätä argumentaatiota ei sitten sovelletakaan.

Esperanto ei siis ole kielenä katoamassa, mutta maailmankieltä siitä ei ole tullut. Esperanton käyttäjät ovat vain pysyvä muistutus siitä, että asiat voisi tehdä toisinkin, ja vaihtoehtoryhmiä maailma kyllä tarvitsee. Ehkä sitten, kun englannin suora käyttö taas vähenee tietokoneiden ja älypuhelimien käännösohjelmien alkaessa hoitaa kansainvälisen viestinnän välitystehtävää, esperantistit tulevat muistuttamaan luonnollisen kielen ylivoimaisuudesta suorana viestintävälineenä.

Jouko Lindstedt

Helsingin yliopisto, nykyykielten laitos

Koncerto en Raŭmo

La 12an de januaro okazis ĝuinda koncerto en la Liceo de Raŭmo. La gefiloj de nia prezidanto *Tuomo Grundström* kun siaj geamikoj aranĝis memorindan kaj ĝojigan duhoran feston por sia patro. Antaŭ la muzika parto oni povis refreŝigi sin per pomoj, akvo kaj bombonoj en la halo kaj viciĝi por gratuli Tomason pro la jam en decembro pasinta 60-a naskiĝtago. Laŭ lia deziro ne venis florbukedoj, paroladoj kaj donacoj, sed povis esti donacata mono al UNICEF – kolektiĝis preskaŭ 3000 eŭroj en la koncerto, kaj rekta al konto 1050, sume 4028,35 eŭroj por la infanhelppa fonduso. Gajnis ankaŭ nia afero: tri ĵurnaloj intervjuis pri la okupiĝoj de la maljuniĝinto.

La koncerto fariĝis varia kaj ”senprecedenca”, kiel T.G. antaŭdiris en EAF-agadas. Mi menciu nur la himnon *Päivä vain ja hetki kerallansa*, kantojn de *Kaj Chydenius*, la Raŭma-

dialektan *Nia fajrobrigad’* (esperantigo de T.G. mem, prezento de vira koruseto ”Serp”), rumanajn popoldancojn de *Bartók*. *La Internacio* kaj *La Espero* estis la internaciaj, *Arvon mekin ansaitsemme* nacia kaj *Päivä vain* ĉiela himnoj laŭ deziro de la prifestado. La etoso estis gaja, mojosa, kiel diras gejunuloj. Ĉeestis preskaŭ tricento da aŭskultantoj, inter ili ses esperantistoj. Ĉiuj gefiloj de T.G. kantis, *Eero* ludis pianon, harmoniumon kaj buŝharmonikon, *Anna* violonĉelon, *Esko* kontrabason kaj akordeonon. Li ankaŭ anoncis la prezentatajn kun verva humuro. Kunagis kolegaj geamikoj *Anna Wegelius*, *Riikka Helske*, *Essi Putkonen* kaj *Tero Pajunen* kun kanto kaj variaj instrumentoj. La dankema publiko kunkantis dum la *Encore* la klasike-popularan *Kalliolle kukkulalle*.

Saliko

Somera Esperantokurso en Orivesi – pliaj informoj

Kion vi intencas fari en la venonta somero?

Ĉu vi povus uzi kvin tagojn por lerni kaj uzi la komunan lingvon Esperanto? Por ĉi tio *Orivesi*-instituto estas bona loko, kie okazos Esperantokurso inter la 8a ĝis la 12a de julio. Ni lernos la lingvon dum lecionoj, kantoj, ludoj kaj krome aŭskultante interesajn prelegojn pri la lingvo litova kaj kiel mastri sian tempon. Ni ankaŭ konatiĝos kun la urbetoj. La kurso komenciĝos lundon la 8an de julio je 11h30 per lunĉo kaj malfermo je la 13a. La kursosemajno finiĝos vendrede 12.7. per lunĉo kaj je la 13a estos fermo kaj posttagmeza kafo. Instruos *Sylvia Hämäläinen* en la grupo 1 (komen-canta) kaj *Dalia Pileckienė* el Litovio en la grupo 2 (daŭriganta). La grupo 3 (jam uzantoj de la lingvo) laboras sub gvidado de *Jukka Laaksonen*. Ankaŭ la kroman tempon ni uzos multflanke esperantlingve.

Estas facile veturi al Orivesi aŭ trajne aŭ buse. Pliaj scioj pri tio venos poste.

KURSOKOTIZO estas 390 € kiu inkludas instruadon, loĝadon kaj manĝojn (matenmanĝo, lunĉo, kafo, vespermanĝeto). Krompago por unu-persona ĉambro estas 80 €.

ALIGO ĝis 14.6.2013. Finne (aŭ se vi scipovas la finnan lingvon) aliĝu rekte al *Oriveden Opisto*. El eksterlando kontaktiĝu kun *Tiina Oittinen*, la sekretario de EAF, ĉar la oficejoj de la instituto ne scipovas Esperanton. Aliĝante informu en kiu grupo vi intencas partopreni. Pliajn sciojn vi trovas en www.esperanto.fi/tampere/ aŭ kontaktiĝu kun *Sylvia Hämäläinen*.

Mitā aiot tehdā kesällä?

Voisitko viettää viisi päivää yhteiskieli esperantoa oppien ja käyttäen? Tähän olisi hyvä paikka Oriveden opisto, jossa pidetään esperantokurssi 8.–12. tulevaa heinäkuuta. Kieltä opitaan oppitunneilla, yhdessä laulaen, pelaten sekä kuunnellen mielenkiintoisia esitelmiä liettuan kielestä ja oikeasta ajankäytöstä. Tutustumme myös paikkakuntaan.

Kurssi alkaa maanantaina 8.7. klo 11.30 lounaalla, jonka jälkeen klo 13 on kurssin avaus. Tämä kesätapaamisemme loppuu perjantaina 12.7. lounaaseen klo 13 alkavaan päätökseen ja päiväkahviin. Opettajina ovat ja *Sylvia Hämäläinen* ryhmässä 1 (alkeiskurssi), *Dalia Pileckienė* Liettuasta ryhmässä 2 (jatkokurssi) sekä ryhmän 3 (kieltä jo käyttävät) vetäjänä on *Jukka Laaksonen*.

Orivedelle on helppo matkustaa sekä junalla että bussilla. Tarkempia tietoja tulee myöhemmin.

KURSSIMAKSU 390 € sisältää opetuksen, majoituksen ja ruokailut (aamiainen, lounas, kahvi, iltapala). Lisämaksu 1 h huoneesta on 80 €.

ILMOITTAUTUMINEN 14.6.2013 mennessä. Suomea puhuvat ilmoittautuvat suoraan Oriveden Opistoon, muut Esperantoliiton sihteeri *Tiina Oittinen*lle. Ilmoittautuessasi kerro myös mihin ryhmään ajattelet osallistua. Lisätietoja löytyy www.esperanto.fi/tampere/ tai ottamalla yhteyttä *Sylvia Hämäläiseen*.

Bonvenon! / Tervetuloa!
Sylvia Hämäläinen

KONTAKTOSCIJOJ / YHTEYSTIEDOT

Oriveden Opisto, www.orivedenopisto.fi, orivedenopisto@kvs.fi, Koulutie 5, 35300 Orivesi, tel./puh. 020 7511 511
Tiina Oittinen, eafsekretario@esperanto.fi, 050 549 4709 (de eksterlando/ulkomailla +358 2 230 5319)
Sylvia Hämäläinen, sylvia.h@kolumbus.fi, F.E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere, tel./puh. 050 321 4313 (de eksterlando +358 50 321 4313)

Nia litova instruistino en la kurso en Orivesi Dalia Pileckienė

Dalia havas edzon kaj du jam memstarajn filinojn. Dalia studis en Kaunas kaj Vilnius kaj fariĝis inĝeniero pri mastrumado pri restoracioj kaj kafejoj. Ŝi estas krome magistro i.a. pri sociala laboro kaj mastrumado de socialaj organizoj.

Dalia estis estrino de diversaj entreprenoj (restoracioj, kafejoj, hoteloj). En la 2000aj jaroj ŝi instruis en universitatoj kaj altaj lernejoj pri la jam menciitaj fakoj.

Dalia esperantistiĝis en la jaro 1994. Ŝi laboris kvarfoje en la organiza teamo dum Baltaj Esperanto-Tagoj (BET) en Litovio kaj estis LLK-ano pri loĝiga servo dum UK en Vilnius 2005.

Nia venonta instruisto diplomiĝis kiel Ĉeinstruisto (A, B, C-niveloj) en 2004. Dalia gvidis plurajn paroligajn kursojn kaj kvin fojojn gvidis kursojn je nivelo B1 dum Somera Esperanto-Semajno (SES, Slovakio).

Lietualainen opettajamme Oriveden kurssilla Dalia Pileckienė

Dalialla on aviomies ja kaksi jo omillaan elävää tytärtä. Dalia opiskeli Kaunasissa ja Vilnassa ja on ravitsemusalan insinööri. Hän on lisäksi

muun muassa sosiaalisen työn ja sosiaalisten järjestöjen hallinnoimisen maisteri.

Dalia on ollut useiden ravintoloiden, kahviloiden ja hotellien johtaja. 2000-luvulla hän on opettanut yliopistoissa ja korkeakouluissa edellä mainittuja aineita.

Dalia löysi esperanton vuonna 1994. Hän on neljänä vuonna ollut järjestävissä ryhmässä, kun Baltian Esperantopäivät BET on pidetty Liettuassa, sekä oli Vilnan Maailmankongressissa 2005 järjestämässä yöpymispaikkoja.

Ensi kesän opettajamme sai vuonna 2004 todistuksen esperanton opettamisesta esperantoksi, tasot A, B ja C. Hän on ohjannut useita esperanton puhumisen kursseja ja viisi kertaa opettanut kesäkurssilla SES Slovakiassa tasolla B1.



Dalia Pileckienė (dekstre apud Roman Dobrzynski). Foto: Saulius Pileckis, esperanto.lt

Kalle Kniivilä en la aprila malferma tago

Unu el la plej konataj esperantistaj ĵurnalistoj, *Kalle Kniivilä*, estos la ĉefgasto en la 38-a Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA sabaton, la 27-an de aprilo. Kniivilä estis estrarano de UEA pri informado 1998–2001 kaj tiam redaktis la dokumenton "Gvidlinioj por informado pri Esperanto", kiu aperas komence de la Jarlibro de UEA. Nuntempe li estas konata unuavice kiel redaktanto de la populara retbulteno "Libera Folio", kiun li lanĉis en aprilo 2003.

Kniivilä faros en la tago du prelegojn. Unu el ili temas pri specifajoj de la Esperanta gaze-

taro, dum en la alia li parolos pri tio, kio en la fenomeno Esperanto povus interesi profesiajn ĵurnalistojn.

En la programo estos krome libroprezentoj kaj filmoj. Krom de specialaj ofertoj la vizitantoj povos profiti de ĝenerala sesona rabato en la libroservo, butikumi en la bazaro de esperantaĵoj, kaj gajni premion en senpaga loterio. Kafo kaj teo, same senpagaj, estos varmaj la tutan tagon. La programo daŭros de la 10-a ĝis la 17-a horo.

(laŭ GK 488)

Mia unua granda esperanta renkontiĝo

Mi eklernis Esperanton jam antaŭ preskaŭ kvin jaroj, sed mi ne ankoraŭ havis eblon por partopreni grandan renkontiĝon. Jam somere mi certis ke mi partoprenos venontan JESon kaj aĉetis flugbiletojn jam en aŭgusto kaj aliĝis por la renkontiĝo tuj kiam tio estis ebla.



Mia ekvojaĝtago estis la 27-a de decembro. Matene mi rigardis novaĵon ke ĉiuj flugoj malfruiĝas en flughaveno pro problemoj en *check-in*. Mi timis ke mi ne sukcesas ŝanĝi mian aviadilon en Frankfurto, ĉar mia ŝanĝtempo estis nur iom pli ol unu horo. Feliĉe miaj flugoj estis ĝustatempaj, kaj alvenis vespere bone en Lepsiko. En Lepsiko estis tre malhela vetero kaj pluvis iomete kaj nenie estis neĝo. Tio estis tre morna post vintra Finnlando. En Lepsiko mi tranoktis en motelo.

Vendrede mi renkontis en la lepsika stacidomo geesperantistojn el Ĉeĥio, Slovakio, Hungario kaj Dresdeno por partopreni ĉeĥan karavanon al Naŭmburgo. Vojaĝantoj en la karavano estis pli ol dudek. En la trajno jam kelkaj samideanoj kantis kantojn kaj unu ludis gitaron. Ni alvenis jam je la tagmezo al Naŭmburgo. El la stacidomo ni vojaĝis per malnova tramo al junulara gastejo, kie JES okazis. Dum la unua vespero estis interkona vespero, kie oni dividis partoprenantojn al grupoj laŭ naskiĝmonato por kvizo. Vespere estis diskejo kaj kinejo, kie oni povis rigardi filmojn en Esperanto aŭ en originala lingvo kun Esperantaj subtekstoj. Dum semajno en la kinejo estis filmoj kiel *Shrek 4D*, *Avatar*, *Slumdog Milionulo* kaj "Mazi en Gondolando". En la kelo estis trinkejo, kie oni povis pagi nur per steloj. Unu eŭro estis iom pli ol kvar steloj. En trinkejo oni nature povis ankaŭ ŝanĝi eŭrojn al steloj.

Dum la semajnfino estis urbogvidado, kie gvidisto estis *Johannes Müller*. En Naŭmburgo

oni vidis ekzemple malnovajn preĝejojn, parton de malnova urba muro kaj statuon de filozofo *Friedrich Nietzsche*. Semajnfine estis koncertoj de *Platano*, *Jomo*, *42* kaj *Jonny M*. Alternativo por trinkejo estis Gufujo, kie oni povis trinki ekzemple teon. En Gufujo estis ankaŭ koncertoj. Antaŭtagmeze okazis Espe-

ranta instruado por komencantoj. En JES estis ankaŭ komencantoj, kiuj ankoraŭ ne scipovis la lingvon. Dum semajno estis ankaŭ kursoj por diversaj lingvoj, kiel la hungara, la pola, la soraba kaj la germana.

Lunde estis novjar-vespera speciala programo. Vespere estis silvestra balo kaj por vespermanĝo estis silvestra bufedo. Sur la muro de la trinkejo estis listo de horzonoj de la mondo. Kaj ekzemple je la naŭa rusoj festis novan jaron, ĉar tiam la jaro ŝanĝiĝis en Moskvo. Samtempe kun Finnlando festis ankaŭ geesperantistoj el Litovio kaj el Ukrainio je la deknua, kiam en Finnlando la jaro ŝanĝiĝis. Tiam oni aŭdis ankaŭ kanton en la finna lingvo. Vespere ankaŭ oni fotis grandan kolektivon, kie estis plejmulto de 258 JES-partoprenantoj. Je la noktmezo slovakoj festis ankaŭ la dudekan naskiĝtagon de Slovakio. Festanoj kalkulis sekundojn al venonta jaro kaj post jarŝanĝo oni deziris feliĉan jaron unu al la alia. Vespere estis ankaŭ en karaokeo en la trinkejo. En la lasta parto de la mondo ŝanĝiĝis la jaro je la deknua horo laŭ germana horzono, kaj kelkaj homoj festis ankoraŭ tiam.

Je la unua tago de nova jaro estis ekzemple humura kvizo. Dum la semajno estis vespere kutime antaŭ vespermanĝo "aligatorejo" aŭ "kajmanejo", kie partoprenantoj estis en la ĉambro kaj rajtis paroli nur fremdlingvojn ekskluzive de Esperanto. Kiel kutime eble en Esperantujo, oni provis pli ofte paroli per iu alia

lingvo ol angle. Je la dua tago de januaro estis ekzemple renesancaj dancoj, kie oni povis lerni danci ilin. Vespere estis koncertoj de *Tone* kaj *Danghera* el Danio kaj en trinkejo estis ree karaokeo.

Ĵaŭdo tria de januaro estis la lasta tuta tago en JES. Tiam estis ekzemple eblo iri al naĝejo kaj diskuto pri estonto de JES. Vespere estis Internacia Vespere, kiam kelkaj homoj ekzemple ludis per iu ludilo aŭ rakontis mallongajn rakontojn. Vespere estis longe atendita koncerto de *La Perdita Generacio*. Ili ludis ankaŭ kelkajn kantojn, kiuj estis tutfreŝaj. Trinkejo kaj diskejo estis ankaŭ malfermaj en la lasta nokto, sed diskejo estis nur ĝis la kvara horo.

Vendrede jam matene ekiris karavanoj al Ĉeĥio kaj al Francio. Nun mi ne vojaĝis kun karavano ĉar mi havis planon por vojaĝi kun norvega esperantisto al Lepsiko. Sed tiu plano

malsukcesis, ĉar mi perdis la norvegan esperantiston *Geir* en stacidomo kaj bedaŭrinde ni ne interŝanĝis antaŭe niajn telefonnumerojn. Mi vojaĝis poste trajne unue al *Halle* kun berlinkaravanistoj – feliĉe, ĉar mi ne sciis, ke en Germanio oni devas stampi trajnbileton jam sur la pasaĝerkajo kaj en trajnoj ne estas stampiloj, kaj ni diris al kontrolisto ke mi vojaĝas ankaŭ per karavano. Post Halle mi vojaĝis sole al Lepsiko. Sabate mi flugis el Lepsiko tra Munkeno al Helsinko. Mi alvenis antaŭ noktmezo al la flughaveno *Helsinki-Vantaa*. Tiam mi ne ankoraŭ rajtis dormi, ĉar mi devis disdoni ĵurnalojn ekde la dua horo, tio estis historia nokto, ĉar *Helsingin Sanomat* aperis en tiu nokto lastfoje per broadsheet-grando, sed mia unua Junulara E-Semajno estas eble pli historia por mi!

Tuomas Latva-Pirilä

De la prezidanto de Antaŭen

La finiĝinta jaro estis la 125-a datreveno de nia lingvo Esperanto kaj la 91-a funkciigado de nia societo. Dum la jaro ni povis informi pri Esperanto ekz. dum la aranĝo “Maailma meillä” en la ĉefbiblioteko *Metso*. La intereso dum tiu kaj aliaj aranĝoj, kie ni povis informi, ne estis tro kuraĝiga. Aliflanke ni scias, ke niaj retpaĝoj estas vizitataj, kaj tio montaras, ke la intereso pri Esperanto ne ĉesis. Ni vivas jam dum pluraj jaroj tempon de forta ŝanĝiĝo de tutmonda komunikado. Ne plu eblas scii la kvanton de interesitoj aŭ aktivuloj laŭ la membronombroj de asocioj kaj societoj. Samtempe, kiam la kontaktado inter unuopaj homoj liberiĝas, estos pli kaj pli malfacile gvidi kaj administri diversajn movadojn. La fina rezulto de la evoluo ne estas videbla, ĉar ĉiam aperas novaj kaj antaŭe ne imageblaj manieroj por komunikadi kaj kontaktadi. Eĉ ekonomiaj krizoj ne ŝajnas bridi la evoluon. Ne konsiderante krimajn aspektojn, granda minaco de la evoluo estas, ke malape-

ras la persona, vid-al-vida konateco de unu homo kun la alia.

La evoluo kaŭzas problemojn por tradiciaj societoj kaj asocioj. Kiel la organizoj pagu siajn kostojn, kion ili faru pri siaj ejoj kaj posedaĵoj, se ne ekzistas membroj, kiuj pagas kotizojn? Kien oni metu malnovajn dokumentojn kaj librojn? Kion fari pri certe valoraj malnovaj fotoj, sonbendoj kaj filmoj, kiujn oni ne kapablas konverti al modernaj teknikoj? Kiel kontakti kun tiuj, kiuj ne havas aŭ ne scias uzi modernajn komunikilojn? La respondoj ne estas simplaj (se oni ne volas konsideri la alternativon forĵeti ĉion). Por la nova jaro mi forte esperas, ke ni serioze klopodu mediti la funkcieblecojn de nia societo Antaŭen. Tamen laŭ la nomo de nia societo, en pozitiva pensmaniero.

Mi deziras al vi sukcesplenan, ĝojigan kaj feliĉan jaron 2013

Jukka Laaksonen
(el *SurogatoVekilo 1/2013*)



Vintraj Tagoj – Talvipäivät

Lastaj informoj

Kunvenejo: Salono Pengersali

Adreso: Pengerkatu 11 A 3, Helsinki

Temo: Literaturo kaj aliaj kulturaj eventoj

Aihe: Kirjallisuutta ynnä muuta kulttuuria

Nun vere indas partopreni en Vintraj Tagoj de EAF en Helsinki, en la semajnfino de 16-an – 17-an de marto 2013. La salono *Pengersali* estos facile atingebla per tramoj aŭ busoj kiuj veturas laŭ *Hämeenkatu*. Ni ja havos ne tre oftan gaston kiel nian ĉefpreleganton: *Osmo Buller* venos sciigi al ni aktualaĵojn el la Centra Oficejo de UEA kaj alie el Esperantujo. La titolo de lia prelego estas *UEA antaŭ defioj – UEA haasteiden edessä*.

Sed ni havos ankaŭ alian gaston, kiu venos preskaŭ rekte el la ĉi-jara UK-lando. *Siru Lai-*

ne, membro de la Loka Kongresa Komitato, nun denove loĝas en Turku, kie ŝi antaŭ kelkaj jaroj lernis Esperanton sub gvidado de *Jorma Ahomäki*. Siru venos inviti nin al Rejkjaviko kaj rakonti pri la situacio de la preparoj. Kaj kompreneble ŝi prezentos al ni la belan kongreslandon. Siru estos kun ni en la vespera programo, kiun komencos ŝia prelegeto.

Aliaj programeroj sabate estos la kunvenoj de la membrosocioj laŭ alvokoj kaj la jarkunveno de EAF. Venu influi nian estontan agadon, ni bezonas vin ĉiujn.

Vespere post la informoj el Islando ni prezentu ĉiuj niajn plej ŝatatajn librojn kaj fine faros komune scenojn el la teatraĵo *La botistoj* sub gvido de Tomaso.

Dimanĉe ni vizitos laŭprograme *Urho Kek-*



Programo – Ohjelma (ŝanĝoj eblas – muutokset mahdollisia)

Sabato / Lauantai, 16.3.2013

10.00–12.00 Kunveno de membrosocioj de EAF laŭ alvokoj. Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöjen kokouksia.

12.00–13.00 Lunĉo memstare. Lounas omatoimisesti.

13.00–14.30 Malfermo de la tagoj. Prelego de Osmo Buller: UEA antaŭ defioj. Päivien avaus. Osmo Buller, Esperanton maailmanliitto: UEA haasteiden edessä.

14.30–15.00 Kafo. Kahvi.

15.00–17.00 Jarkunveno de EAF (komence kontrolo de rajtigiloj). Suomen Esperantoliiton vuosikokous (aluksi valtakirjojen tarkastus)

17.00–18.00 Paŭzo. Tauko.

18.00–18.30 Komuna vespermanĝeto (picoj, salato, ks.). Yhteinen iltapala (pizzaa, salaattia yms.).

18.30–20.30 Preparoj al la 98-a UK en Rejkjaviko, Islando, Siru Laine el LKK. Literatura vespero: rakontu kaj eventuale kunportu viajn plej ŝatatajn librojn. Komuna teatraĵo de *Botistoj*. Maailmankongressi Reykjavikissa 20.–27.7. Siru Laine kertoo järjestäjien terveisiä. Kirjallisuusilta: ota mukaasi, jos mahdollista, esperantokieliset lempikirjasi ja kerro niistä. Näytellään yhdessä Nummisuutareita.

Dimanĉo / Sunnuntai, 17.3.2013

10.00–10.55 Renkontiĝo(j) ĉe haltejo de buso 24 apud

Kiasma (muzeo de moderna arto), halteja nomo:

Lasipalatsi por komuna ekiro al Tamminiemi. Tapaamisia pienryhmissä museoon menoa varten, kokoontumispaikka Kiasman bussipysäkki (nimi Lasipalatsi), bussi nro 24.

10.30–10.55 Kolektiĝo ĉe la muzea pordo de Tamminiemi. Kokoontuminen Tamminiemen museon portille adreso/osoite: Seurasaaentie 15.

11.00–12.00 Vizito kun finnlingva ĉiĉerono en Urho Kekkonen-muzeo en Tamminiemi. Aliĝo necesas! Tutustuminen suomenkielisen oppaan kanssa Urho Kekkonen museoon Tamminiemessä. Ilmoittautuminen tarpeen!

12.30–14.00 Lunĉo mepagante en proksima restoracio (nomo anoncita poste).

Diskutado i.a. kun Osmo B. Aliĝu! Yhteinen lounas omakustanteisesti läheisessä ravintolassa (nimi ilmoitetaan myöhemmin). Keskustelua mm. Osmo B:n kanssa. Kerro jos ole tulossa mukaan!

14.00– Bonan hejmvajaĝon! Hyvää kotimatkaa!



Osmo Buller



Pengersali interne.

konen-muzeon en *Tamminiemi*, kiu estis lia prezidento rezidejo kaj poste lia hejmo. Vi povos veturi kune en grupo per buso aŭ alimaniere; estu ĉe la muzea pordego plej laste je 10.55 por ke ni povu eniri komune. Aliĝu al la vizito por ke ni sciu kiuj venos kaj povu prizorgi la enirpagon por vi.

Pliaj praktikaĵoj: mendu la VT-manĝopaketon, se vi deziras havi kafon kaj vespermanĝon en Pengersali sabate. Kaj aliĝu al la dimanĉa lunĉo por ke ni sciu, kiom da lokoj necesas mendi en la restoracio.

Talvipäivät ovat 16.–17.3.2013 Pengersalis-
sa Helsingissä ja tällä kertaa varmasti kannattaa tulla paikalle. Esperanton maailmanliiton (UEA) päämajan johtaja Osmo Buller ei ihan joka vuosi pääse kotimaansa esperantotapahtumiin, joten on hienoa kuulla mitä hänellä on kerrottavana. Hänen luentonsa aihe on *UEA antaŭ defioj – Esperanton maailmanliitto haasteiden edessä*. Osmo vastaa toki myös suomenkielisiin kysymyksiin.

Lisäksi monipuolinen ohjelmamme on täydentynyt uudella vieraalla lähes suoraan Islannista. Tämän vuoden maailmankongressin järjestelytoimikunnassa on mukana turkulainen Siru Laine, joka aikanaan opiskeli esperantoa Auralan kansalaisopistossa Jorma Ahomäen johdolla. Siru tulee kertomaan lauantai-iltana yliopisto-kaupungistaan Reykjavikista ja muutenkin Islannista sekä innostamaan meitä kaikkia mukaan.

Lauantaina on Osmon ja Sirun esitysten lisäksi jäsenjärjestöjen kokouksia kokouskut-



ALIĜILO



Mi aliĝas al la Vintraj Tagoj de EAF 16.–17.3.2013 en Pengersali, Helsinki.

Nomo: _____

Adreso: _____

Tel./Fakso/Ret-adreso: _____

Aliĝkotizo (enhavas muzean viziton):

15 EUR ĝis 28.2.2013 _____

20 EUR poste 28.2.2013 _____

Duono por FEJO-anoj sub 30 jaroj. Infanoj sub 15 jaroj sen aliĝkotizo. Personoj loĝantaj ekster Finnlando laŭ interkonsento.

VT-manĝopaketo: 20 EUR _____

(inkl. kafon kaj vespermanĝeton en Pengersali sabate; tranoktejon kaj ceterajn manĝojn ĉiu prizorgu mem).

Muzea vizito dimanĉe: _____

(aliĝo necesas)

Lunĉo dimanĉe: _____

(pago surloke, ni petas aliĝon por scii kiom da lokoj necesas).

Entute pagenda al la konto de EAF: _____

Pagoj al la konto:

Danske Bank FI11 8000 1700 2308 25

Bv. uzi la VT-referencnumeron 4640 (ne skribu aliajn informojn en la pagilo).

Pliaj informoj aŭ deziroj al EAF: _____

Bonvolu sendi la aliĝilon al:

Esperanto-Asocio de Finnlando

Siltasaarenkatu 15 C 65

FI-00530 Helsinki

Retaj aliĝoj tra eafmendoj@esperanto.fi

BONVENON!



Venontaj



Pengersali la doma eniro.

sujen mukaan sekä liiton vuosikokous. Tulkaa mukaan vaikuttamaan liittomme tulevaisuuteen, liitto tarvitsee aktiiveja.

Ilalla Islannin kuulumisten jälkeen vietämme kirjallisuusiltaa. Jokainen saa kertoa esperantonkielisestä lempikirjastaan. Kirja voi olla runoa, proosaa, dokumenttiteos, dekkari, sarjakuva tai mikä muu tahansa, kunhan kieli on se oikea. Ja lopuksi Tuomon johdolla näytellään otteita Nummisuutareista. Se on ensimmäisiä esperantoksi käännettyjä suomalaisia tekstejä: Hilma Hall, kustantaja *Eldona akcia societo Otava*, paino *Presejo de K. F. Puromies A.S., Helsingfors* vuonna 1919.

Aliĝo kaj kontaktpersonoj

Bonvolu sendi la aliĝilon al la EAF-oficejo de Helsinki aŭ se vi volas aliĝi rete, uzu la adreson eafmendoj@esperanto.fi. Krome pagu la kotizon al la konto de la Asocio *uzante la referencnumeron*. Notu, ke estas tre grave fari ambaŭ: **kaj pagi kaj sendi la aliĝilon** por ke ni organizantoj sciu, kiu volas kion dum la VT. Treege gravas aliĝo por dimanĉa muzea vizito! Kun eventualaj demandoj vi povas turni vin al estraranoj de EAF. Pri programaj aranĝoj respondas *Paula Niinikorpi kaj Tiina Oittinen*. Kiel ĉefurbanoj *Keke Uber, Päivi Saarinen kaj Tiina Kosunen* povos helpi koncerne al veturiloj kaj tranoktejoj kaj manĝejoj en Helsinki. Koncerne jarkunvenaj demandoj estas je via dispono *Tuomo Grundström*. Päivi Saarinen kune

ILMOITTAUTUMISLOMAKE

Ilmoittaudun Suomen Esperantoliiton talvipäiville 16.–17.3.2013 (Pengersali, Helsinki).

Nimi: _____

Osoite: _____

Puh./fax/sähköposti: _____

Ilmoittautumismaksu (sis. museokäynnin):

15 e.....28.2.2013 asti _____

20 e.....28.2.2013 jälkeen _____

Puoli maksua FEJO:n varsinaisilta jäseniltä. Ilman maksua alle 15-vuotiaat lapset. Suomen ulkopuolella asuvat henkilöt sopimuksen mukaan.

Talvipäivien ruokapaketti: 20 e _____

(sisältää kahvin ja iltaruoan lauantaina Pengersalissa, muut ruoat samoin kuin majoituksen jokainen hoitaa itse).

Museokäynti sunnuntaina: _____

(ilmoittautuminen välttämätön).

Lounasvaraus sunnuntaina: _____

(maksetaan paikalla, ilmoittautumista pyydetään paikkamäärän varmistamiseksi).

Maksut yht. Suomen Esperantoliiton

tiilille: _____

Tilinumero:

Danske Bank FI11 8000 1700 2308 25

Käytä viitenumeroa 4640 (ei muita tietoja viite- tai viestikenttään maksun yhteydessä).

Lisätietoja ja/tai toivomuksia: _____

Lähetä lomake osoitteella:

Suomen Esperantoliitto

Siltasaarenkatu 15 C 65

FI-00530 Helsinki

tai tiedot sähköpostitse eafmendoj@esperanto.fi

TERVETULOA!

kun Tiina Kosunen prizorgas pri la aliĝiloj kaj pagoj. Kontaktinformojn de ĉiuj sur paĝo 2.

Bonvenon!

Ilmoittautuminen ja yhteyshenkilöt

Ilmoittaudu lähettämällä lomake Suomen Esperantoliiton toimistoon tai kertomalla vastaavat tiedot sähköpostitse osoitteeseen eamfendoj@esperanto.fi. Maksa osallistumis- ja pakettimaksu ilmoittautumisen mukaisesti liiton tilille. *Muista käyttää viitenumeroa*, jonka kanssa ei pidä kirjoittaa muita tietoja. Huomaa, että pelkkä maksun hoitaminen ei riitä, **tarvitsemme myös ilmoittautumistiedot**, jotta tiedämme

mitä olet tilannut ja milloin tulet. Erityisen tärkeää on ilmoittautua sunnuntain museokäynnille! Talvipäiviin liittyviä asioita voi kysyä liiton toimihenkilöiltä seuraavasti: Ohjelma ja ruokailut Pengersalissa Paula Niinikorpi ja Tiina Oittinen (museokäynti). Liikenneyhteydet, majoittuminen ja ruokailut Helsingissä: Keke Uber, Päivi Saarinen ja Tiina Kosunen (kaikki pääkaupunkiseudulta). Vuosikokous, omien kokousten tilavaraukset: Tuomo Grundström kaj Tiina Oittinen. Maksuasiat: Päivi Saarinen ja Tiina Kosunen. Kaikki en yhteystiedot ovat lehden sivulla 2.

Tervetuloa!

KER-ekzameniĝu en Helsinki!

Venu facile ekzameniĝi en via hejmlando kaj tamen en internacia etoso! Samtempe kun vi ekzameniĝos dekoj da kandidatoj en la tuta mondo!

Skriba ekzamensesio okazos jam la duan fojon en Helsinki sabate la 8an de junio 2013. La parolan parton eblos fari, se oni tiel deziras, iam poste, ekzemple dum la Universala Kongreso.

Nun eblas ekzameniĝi je la baza (B1), meza (B2) aŭ supera (C1) nivelo laŭ Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj (KER). La ekzameno daŭros du, tri aŭ kvar horojn laŭ la nivelo. En la paĝaro www.edukado.net/ekzamenoj/ker/ estas utilaj informoj pri la ekzameno, ekzemple

priskribo de la ekzameno, kriterioj, specimenoj kaj prezoj.

Rimarku, ke la oficialan aliĝon al la ekzameno oni faras en la adreso www.edukado.net/ekzamenoj/ker/sesioj. La ekzamensesio en Helsinki realiĝos, se almenaŭ kvin kandidatoj aliĝos.

La ekzamensesio komenciĝos je la 10a horo kaj la loko estos kunvenejo Pengersali. En la sama ejo okazos la ĉi-jara Vintraj Tagoj de EAF. La adreso estas Pengerkatu 11 A 3, Helsinki.

Demandojn vi povas adresi al paula.niinikorpi@gmail.com.

Paula Niinikorpi, la loka organizanto

Deĵorhoroj en la oficejo de EAF, Toimiston päivystykset

La oficejo de EAF deĵoras ĉiumarde inter la 17a kaj 19a horoj.

Esceptoj estas la 30a de decembro 2013, kiam la deĵoro okazos jam lunde (je la kutima tempo), kaj la 30a de aprilo kiam la deĵoro estos jam du horojn pli frue, do de la 15a ĝis 17a horoj.

Telefona numero al la oficejo estas 044 264 2742 al kiu eblas sendi ankaŭ tekstmesaĝon. La oficeja adreso estas Siltasaarenkatu 15 C 65, Helsinki. Bonvenon!

Suomen Esperantoliiton toimistolla on päivystys joka tiistai kello 17–19.

Poikkeuksena on vuoden viimeinen päivystys, joka on jo maanantaina 30. joulukuuta 2013 normaaliin aikaan. Toinen poikkeus on vapunaatto, tiistai 30. huhtikuuta, jolloin päivystys on jo kello 15–17.

Toimiston numero on 044 264 2742, johon voit lähettää myös tekstiviestin. Osoite toimistolle on Siltasaarenkatu 15 C 65, Helsinki. Tervetuloa!

Antaŭ 75 jaroj: La pereco de Esperanto en Soveta Unio

La nuna jaro markas la 75-an datrevenon de la likvido de la sovetia Esperanto-movado. En 1937/38 granda nombro de esperantistoj estis arestita, la plej multaj en februaro kaj marto 1938. Tiu terura ĉapitro de nia historio estis dum kvindek jaroj preskaŭ kaŝita.

La 21-an de marto 1938 *Nikolaj Rytjkov*, Moskva aktoro, revenis al sia loĝejo. Estis malfrue, ĉar la teatra prezentado okazis en la vesperaj horoj. Antaŭ ol ekdormi, li, “nokta birdo”, kun sia edzino, same aktorino, legis libron, kiu entenis korespondaĵojn de *Gustave Flaubert*; laŭ ilia kutimo, unu leteron legis ŝi, alian li. Subite, je la tria matene, aŭdiĝis sonorado ĉe la pordo. Enrompiĝis oficiro de la sekreta polico NKVD kun du soldatoj. “Levu la manojn”, ili kriis. Komenciĝis traserĉado, kiu daŭris kvin horojn. Estis konfiskita granda kofro kun leteroj ricevitaj el eksterlando, ĉiuj esperantlingvaj. Rytjkov, al kiu estis adresitaj tiuj leteroj, poste estis forportita al la fifama malliberejo *Lubjanka*.

Rytjkov ne havis ideon, kial li estis arestita. Li jam sciis pri la malliberigo de *Ernest Drezen*, la multjara estro de la sovetia movado, en aprilo 1937. Lin pli konfuzis la arestiĝo (en februaro kaj marto 1938) de malpli elstaraj esperantistoj, liaj amikoj *Petro Gavrilov* kaj *Ferenc Robicsek*. Li komencis kompreni, ke okazas io nejusta. Tamen, Rytjkov plue korespondis, sendante kaj ricevante leterojn, kaj tute ne imagis, ke sole tio faras lin suspektinda. Dum la pridemandado en *Lubjanka*, dum kiu li estis ankaŭ torturata, la centra temo estis, ke li konfesu pri sia spiona agado kaj nomu siajn kunulojn.

Similan sorton havis milionoj da sovetiaj civitanoj. La esperantistoj laŭnombro estis eta parto de la viktimoj de la t.n. Granda Purigo, per kiu Stalino celis senigi sin de ĉiuj veraj aŭ potencialaj kontraŭuloj de sia sistemo. Fakte,

Rytjkov arestiĝis unu semajnon post la ekzekuto de *Nikolaj Buĥarin* (15.3.1938), per kiu kulminis la likvidado de iamaj kunbatalantoj de Lenino. Inter la esperantistoj Rytjkov estis unu el la lastaj, kiujn trafis la persekutado. Ĉar li ne havis gvidan funkcion, li ne dividis la sorton de aliaj, kiuj estis mortpafitaj.

Rytjkov suferis dum pli ol 17 jaroj en diversaj koncentrejoj. Fine de 1955, du kaj duonan jarojn post la morto de Stalino, li estis liberigita. Li povis reveni al sia aktora profesio kaj tuj reaktiviĝis por Esperanto, kiu sub la reĝimo de *Nikita Hruščov* komencis esti almenaŭ tolerata. Kiam en 1965 li ricevis permeson partopreni Eŭropan Esperanto-Konferencon en Vieno, li decidis resti en okcidento. Fuĝis do la unua sovetia esperantisto, kiu travivis la persekutadon kaj sekve povis rakonti detalojn pri tiam tute nekonata ĉapitro en la historio de Esperanto.

Kiam Rytjkov fuĝis, la movado en la “komunistaj” landoj jam diversgrade reekfloris. Restis limigoj kaj kondiĉoj, unu el kiuj estis silenti pri la temo de persekutoj. Ekde la mezo de la sesdekaj jaroj en Soveta Unio okazadis grandaj junularaj Esperantotendaroj, kies partoprenantoj nur nebule sciis pri la stalina tempo kaj kredeble malmulte emis ŝarĝi sin per tro da scio. Kiam rusa esperantisto foje volis fari prelegon en la Moskva Klubo pri Esperanto en la nazia Germanio, la propono estis rifuzita pro tio, ke traktado de tiu temo invitus al ĝenaj demandoj aŭ eĉ al komparo inter la faroj de Hitlero kaj Stalino. Multe da maltrankviliĝo elvokis ĉapitro pri la persekutoj en la libro *Esperanto en perspektivo* (1974). Dek jarojn poste la Asocio de Sovetiaj Esperantistoj (ASE) nuligis sian promeson aliĝi al UEA, proteste kontraŭ recenzo, kiu aperis en la organo de UEA pri la memoroj de gulaga transvivinto.

Tiu situacio de la soveta movado – kun necerteco kaj limigoj sur la fono de oficiala malfido – restis ĝis la ekrego de *Miĥail Gorbaĉov* en 1985. Estas interese, ke la unuaj antaŭsignoj de ŝanĝo rilatis la historion: pro “glasnosto” rompiĝis ankaŭ la tabuo pri la stalinisma subpremo de Esperanto. En februaro 1988 la revuo *Ogonjok* aperigis leteron de veterano, kiu memorigis pri la lernado de Esperanto en la Ruĝa Armeo en 1922/23; en aprilo gazeto en Odeso publikigis pledon por la rehonorado de persekutitaj esperantistoj; kaj en aŭgusto *Komsomols-*

kaja Pravda raportis, ke al la Ĵdanov-Strato en Kazan’ estis redonita ĝia antaŭa nomo: Esperanto-Strato. Hazarde, preskaŭ samtempe aperis mia libro *La danĝera lingvo*. Komence de 1989 ASE finfine aliĝis al UEA kiel soveta landa asocio. Dank’al la parta aŭ dumtempa malfermo de arkivoj de NKVD post kvindek jaroj eblis nun ekscii precizajn datojn kaj aliajn faktojn pri la malapero de la kremo de la sovetaĵaj esperantistoj.

Ulrich Lins,
laŭ Revuo “*Esperanto*” 2/2013

Mondlingvoj forpasas kaj venas

Ĵaŭde la 10-an de januaro 2013 okazis en la Universitato de Helsinki interesa prelegserio sub la titolo “Mondlingvoj forpasas kaj venas”. Profesoro *Olli Salomies* prezentis la fazojn de la latina lingvo dum jarcentoj en Eŭropo. Ankoraŭ hodiaŭ oni povas vidi klarigajn tekstojn sur prestiĝaj domoj kaj monumentoj en tiu iama glora lingvo. Raraĵo estis teksto de juĝeja verdikto skribita latine en frua mezepoko en malproksima Finnlando. La finna nacia radio-kompanio elsendas hodiaŭ novaĵojn latine. Tiu fakto vekis nur rideksplodon inter la ĉeestantoj.

Profesoro *Jouko Lindstedt* traktis la temon “Ĉu Esperanto malsukcesis?” tre sobre kaj multflanke havante ambaŭ piedojn forte sur la tero. Antaŭ 125 jaroj nur unu viro scipovis la lingvon, kiun hodiaŭ oni parolas en ĉiuj mondpartoj. La revoj de la komenperiodaj esperantistoj pri la grandskala uzado de la lingvo ne realiĝis, sed la lingvo kiel lingvo evoluis, evoluas kaj forte enradikiĝis en la mondo. Relative multaj denaskaj parolantoj ankaŭ raportas pri la flua funkciado de Esperanto en praktiko.

Profesorino *Anna Mauranen* reprezentis la anglan lingvon. Ŝia ĉefa esplorprojekto estas ELF (English as a Lingua franca). Ni ĉiuj scias, ke la angla lingvo sur tiu kampo funkcias, sed diversaj problemoj estas evidentaj. La titolo



Prelega publiko. Foto: Raita Pyhäälä

de la prelego estis “Ĉu ne-denaskuloj detruos la anglan lingvon?” Ekzemple en Barato (Hindia Unio) estas pro multegaj etnaj lingvoj konstateblaj diversaj malfacilaĵoj, kiuj aperas ankaŭ aliloke en la mondo. Ĉiukaze oni uzas tiun al ni konatan komunikilon. Denaskuloj devas adaptiĝi al la situacio, ke oni iel ankaŭ misuzas la literaturan anglan lingvon.

La prelegejo en Helsinki estis plenplena. Vigla diskuto pri la temoj ekestis en la fino de la aranĝo.

Jorma Ahomäki
(publikigita ĉe *Pola Retradio*
en *Esperanto kaj ĉe EAF-agadas-listo*)



Muista lehdistä:

EU:n kielipolitiikka ja arkikieli

Ålandstidningen haastatteli 12.9.2012 Anna Ritamäki-Sjöstrandia Ahvenanmaalla pidetyistä Suomen Esperantoliiton syyspäivistä. Etelä-Suomen Sanomissa oli Mikko Vähä-Sipilän artikkeli EU:n kielipolitiikasta ja käyttökielistä sekä esperantoaktivisti Börje Erikssonin kommentti artikkelista 12.11.2012. Hän arvioi EU-kieliä ja esperantoa.

Orion-konsernin Mixtura-henkilöstölehdessä 2/2012 esiteltiin yrityksen Turussa työskentelevä tuoteassistentti, turistiopas ja esperantisti Tiina Oittinen. Iso Numero -katukulttuurilehden talvinumerossa 2012–13 julkaistiin Tuomo Grundströmin kirjoitus viime vuonna 125-vuotta täyttäneestä esperantosta, sen kehityksestä, leviämisestä ja käytöstä.

Ålandstidningen otsikoi ”Åland blir esperantoland i helgen”, kun kertoi esperantoliiton syyspäivistä Ahvenanmaalla. Tapahuttumaan saapui noin 40 osallistujaa, joista kymmenkunta on ulkomailta, mm. portugalilainen EU-virkamies ja Australiassa syntynyt ja suomalaistunut nuori mies, joka on löytänyt 200 vuoden takaiset sukujuurensa Ahvenanmaalta. Syyspäivien ohjelmaa esitteli Anna Ritamäki-Sjöstrand, joka on äskettäin muuttanut Ahvenanmaalle. Hän järjestää esperanton kielikurssin saarella 2013. Anna toimi syyspäivien oppaana ja esitteli esperantoryhmälle Ahvenanmaan itsehallintotalon sekä maapäivien toimintaa. Ryhmä tutustui myös Kastelholman linnaan ja kirjailija Anni Blomqvistin kirjailijakotiin Simskälässä. Kysymykseen, että ketkä opettelevat esperantoa, Anna vastaa, että sekä kielellisesti lahjakkaat että he, jotka eivät ole oppineet muita kieliä mutta oppivat esperanton. – Jos tapaatte esperantisteja, heitä tervehdittään sanomalla ”saluton” eli hei, kertoi lehti. Juttu oli kuvitettu Annan henkilökuvalla. Mukana oli faktalaatikko, jossa kerrottiin esperanton perustiedot, kielen leviäminen ympäri maailman, vuosikirjan esperantistien osoitetietojen

määrä sekä lernu.net -internet-palveluun rekisteröityneiden esperantistien määrä maailmassa, joka 2011 on 100 000. Zamenhofin tekemän ensimmäisen esperanto-oppikirjan julkaisemisesta on kulu-
nut 125 vuotta.

EU:n kansalliset kielet ja englantia

Etelä-Suomen Sanomissa julkaistussa kolumnissa Mikko Vähä-Sipilä kirjoitti EU:n kieliperiaatteista ja kielten käytön käytännöistä. Hän kertoi, että jokaisen jäsenmaan kieltä käytetään EU:n toimielimissä yhteyksissä näiden maiden kansalaisiin. Käytännössä virkamiehet työskentelevät englanniksi ja ranskaksi. Lisäksi uudet Itä-Euroopan maat ovat jäsenyydellään vahvistaneet englannin asemaa epävirallisena käyttökielenä. Vähä-Sipilän mukaan kielten moninaisuus hajottaa ajatusta yhtenäisestä EU:sta poliittisena organisaationa. Ajatus yleiseurooppalaisesta yhteisestä kielestä – latina, englantia tai esperanto – on kuitenkin utopiaa. Uudet jäsenmaat ovat vain lisänneet kielten kirjoa. Lisäksi Euroopan unionin virkamiesten englannista on vähitellen tullut oma ”kielensä”, kun sitä käytetään kaikkialla Euroopassa EU-asioissa. Börje Eriksson kirjoitti kommentissaan Sipilän artikkelista, että englannin kasvava merkitys EU:ssa ja muualla, kuten tieteen, populaarikulttuurin ja itäalan kielenä, osoittaa, että kansainvälistä yhteiskieltä tarvitaan. Englannin käyttö eri aloilla on muokannut sitä kunkin alan erikoiskielyksi niin, että sen kielellinen yhtenäisyys on kadonnut. EU:n jäsenmaiden kansalliset kielet ovat sen verran voimakkaita, että englannista ei tule unionin yhteiskieltä. Börje piti esperantoa luonnollisena yhteyden välineenä niin pienissä asioissa kuin maailmanlaajuisesti. EU:ssa tulevaisuus on monikielinen, mutta niin, että mukana on yhteinen kansainvälinen kieli. Esperanto ei kuitenkaan ole vain EU:ta varten, se on utopiaa.

Nuorison esperanto

Turun Sanomien Kielestä kiinni -palstalla suomen kielen opiskelija Hannele Rantama kirjoitti nuorten internetissä käyttämästä blogikielestä. Hän kutsui sitä eräänlaiseksi esperantoksi. Blogikieli on nuorisokulttuurista syntynyt yhtenäinen ja kaikkien blogia seuraavien nuorten ymmärtämä kieli, jolla on globaaleja piirteitä. Orion-konsernin *Mixtura*-henkilöstölehden vapaallapalstalla haastateltiin Tiina Oittista. Hän kertoi harrastuksistaan: oppaan työstä ja esperantosta. Hän on käynyt sekä Turun että Naantalin opaskurssit ja käy kummassakin kaupungeissa opastamassa. Tiina puhuu turisteille tarvittaessa saksaa, englantia, ruotsia ja esperantoa. Kakolan vankila Turussa kiinnosti nähtävyytenä myös turkulaisia, kun se oli pari vuotta auki yleisölle.

Palstan yhteydessä on tietolaatikko esperantos-ta, Zamenhofin ajatuksista ja päämääristä, kun hän kehitti kieltä sekä luonnehdinta kielen perusteista. Iso Numero -katukulttuurilehti julkaisi Tuomo Grundstömin kirjoituksen esperanton 125-vuotisesta taipaleesta Suomessa ja maailmalla vakiintuneeksi ja eläväksi suunnitelmakieleksi. Tuomo tarkasteli kielen leviämistä Suomeen, sen asemaa suhteessa muihin suunnitelmakieliin sekä muutamaan kaunokirjallisuudessa esiintyviin keksittyihin kieliin. Hän esittelee kielen kolme menestyksen perustaa sekä toteaa, että kirjallisuus, lehdet, kulttuuritapahtumat ja internet pitävät esperanton elävänä kielenä. Artikkelit on julkaistu aikaisemmin Kalevassa ja Turun Sanomissa.

Jukka Noponen

Esperantajn salutojn de Lappeenranta

Ankoraŭ vivas Esperanto en *Lappeenranta*! Tion ni povis konstati ekz. en nia kristnaska festeto, kiun partoprenis 13 personoj, kvankam tri el ili estis gastoj el *Kangasala* kaj *Imatra*. *Sirpa Honkanen* provis paroligi nin en Esperanto, ĉar laŭ ŝia opinio ni devus en E-klubo paroli nur Esperanton. Ordinare en nia grupo oni povas paroli kiun ajn lingvon, se estas iu aliaj, kiu komprenas tiun lingvon kaj kapablas traduki la lingvon al aliaj. Tamen ni en la festeto manĝis finnan rizkaĉon ege bonan faritan de *Aune Mustonen*.

Por mi E-grupe estas pli kaj pli grava pro mia paralizo, kiam moviĝado estas malfacile. Pli frue mi ofertis Esperanton al aliaj, sed nune ĝi estas por mi. Mi kontaktas per Esperanto. En tiu kontaktado helpas ege multe komputilo, per kiu mi povas per multaj rimedoj kontakti esperantistojn, plej volonte skajpe (<http://skype.com/>). Esperantolehti povus fari malgrandan, trilingvan vortaron nun, kiam ni ankoraŭ ne havas novan vortaron. Bone estus, se pli multaj po-

vus uzi esperantajn signojn, ne ekz. X-literon. Mi ankoraŭ ne kutimiĝis uzi ĝin, ĉar nia grupo havas feliĉon "posedi" membron *Hannu Rasa*, kiu laŭ mia opinio scias ĉion pri komputiloj. Li muntis tiujn signojn en mian aparaton.

Ŝajnas al mi, ke ankaŭ aliaj samaĝuloj ĝuas pri komputilo. Estis ĝojo por mi ricevi mesaĝojn de esperantaj veteranoj *Andrej Pettyn* kaj *Ahto Kaljusaar*. Krom Esperanto nin ligas simila vivstato.

Ankoraŭ unu informo: Se iu leganto havas konatulojn en *Lappeenranta* aŭ alie volos viziti ĝin, ŝi/li povas kontakti nian grupon. Ni kolektiĝas ĉiun duan lundon je la 15a en la libertempa centro de Lappeenranta "Kuutinkulma", Valtakatu 23. Al la informpetoj respondas *Marja-Liisa Kettula*, tel. 050 3257286 kaj *Jorma Toropainen*, 040 7510535.

Jorma Toropainen
jormato35@gmail.com

La Panteono kaj edukado.net

La Panteono estas templo kun kupola tegmento en Romo, konstruigita de imperiestro Hadriano sur loko, kie antaŭe staris samnoma templo konstruigita de Agripo en la jaro 27 antaŭ nia erao. Ekde la j. 609 la roma Panteono estas kristana preĝejo, nuntempe ankaŭ internacia tombigejo. Laŭ la roma modelo estis konstruitaj alilandaj panteonoj, ekzemple en Parizo en 1764-90. Ili fariĝis konataj pro siaj arkitekturo kaj tomboj de la plej grandaj eminentuloj.

Ankaŭ Esperantistoj, almenaŭ la pedagogoj, havas sian Panteonon, lanĉitan kaj prizorgatan ene de la paĝaro de edukado.net. Ĝi enhavas ne nur 66 eminentajn forpasintojn, sed ankaŭ 47 aprezatajn vivantajn instruistojn. Ĉiujare la 15an de decembro estas prezentataj tie ĉ. 15 vivantaj meritplenaj Esperanto-pedagogoj, inter ili nia finna aktivulo *Jorma Ahomäki*. En la jaro 2012 estis enpanteonigitaj 13 Esperanto-pedagogoj el 12 landoj kun siaj fotoj kaj vivresumoj, inter ili la subskribinto. Kvin el la panteonanoj estas el ekster Eŭropo. La plej juna naskiĝis en 1991 (Burundo) kaj la plej aĝa en 1932 (Vjetnamio). Ĉiuj havas siajn meritojn. Vidu la Panteonon ĉe www.edukado.net/biblioteko/panteono, aŭ serĉu per la serĉilo de edukado.net. Ankaŭ vi rajtas proponi iun por enpanteonigo en 2013.

La mirinda portalo edukado.net

La paĝaro estis lanĉita en 2001 kaj celas helpi la laboron de instruantoj de Esperanto. Oni povas konatiĝi kun ĝi en 25 lingvoj!

La konstruon kaj redaktadon unue financis ESF

(Esperantic Studies Foundation). La nuna, tria versio estis konstruita el subvencioj de la membraro. La paĝaron direktas la fondaĵo de Edukado.net kaj la redaktadon financas eĉ nun ESF. La paĝaro havas 2700 membrojn. Sen la nemezurebla strebado kaj sindonemo de doktorino *Katalin Kováts* edukado.net ne povus daŭre evolui kaj neniam atingus siajn celojn: provizi Esperantujon je senpaga moderna kaj pliiĝanta instrumaterialo, konsili, gvidi, trejni instruistojn rete (projekto RITE), okazigi ekzamenojn, ĉeeste kontribui al lingvokursoj, ebligi retan interinstruistan kunlaboron. Kiel lernu.net valoras al lernantoj, tiel edukado.net valoras al progresintoj kaj instruistoj.

Ambaŭ bezonas sponsorojn. Unu el la plej gravaj subtenantoj estas *Synnöve Mynttinen*, sed ankaŭ aliaj finnoj subtenas. Faru vi same, se eblas!

Mirinda estas i.a. la biblioteko de edukado.net, enhavanta 500 senpagajn lernilojn detale prezentatajn, kiujn la vizitanto povas kvazaŭ enmanigi al si de sur breto. Impona estas ankaŭ la kolora vico de la tradukoj de la lernolibro de *Stano Marček*, "Esperanto per rekta metodo", en trideko da lingvoj. Aldone al tio elŝuteblas ekzercoj, ideoj, testoj kaj eblas rete diskuti kun aliaj instruantoj. Se vi vizitas edukado.net, bonvolu ankaŭ ensaluti kaj danki. Kvankam la uzo estas senpaga, ĝi ne estas senkosta! Kaj edukado.net kaj lernu.net bezonas nian subtenon kaj ni nun varbu novulojn por profiti de ili. Antaŭ 10-20 jaroj tia helpilo kia edukado.net estis neimagebla.

Saliko, laŭ IPR

Abono de Juna Amiko

Juna Amiko (JA) estas internacia revuo por komencantoj kaj lernantoj de la lingvo Esperanto.

JA aperas trifoje jare, marte, septembro kaj decembre. La prezo de la jarabono estas 16 € aŭ 3 abonoj al unu adreso po 13 €.

En nia lando por 2012 estis 24 abonantoj (inkluzive la MJA-membroj de ELFI) kaj kvar grupabonoj iris donace eksterlanden.

La enhavo de JA en septembro 2012 estis internacia, kiel ĉiam. Estis prezentita junulara E-studado en Kubo

kaj Benino, intervjuo kun hungarino, prezentoj de la lando Ĉeĥio kaj okazaĵo en Pollando. JA ĉiam enhavas diversajn taskojn, temojn por konversacio kaj ion pri Esperanta literaturo. Ni ne forgesu mencii la paĝojn por etuloj kaj aliaj, kiuj interesiĝas pri bildstria rakontoj.

Bonvolu aboni ĉe Sylvia Hämäläinen
F.E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere
sylvia.h@kolumbus.fi, tel 050 321 4313
konto FI75 8000 2810 3006 80

Suomen Esperantoliiton jäsenjärjestöt

Muutokset ja lisäykset tälle sivulle: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti eafgazeto@esperanto.fi.

Suomen Esperantoliiton paikallis- ja jäsenjärjestöt:

- ♦ Helsingin Esperantoseura / Esperanto-klubo de Helsinki, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. www.esperanto.fi/helsinki jukka.p@esperanto.fi (Jukka Pietiläinen)
- ♦ Iisalmen Esperantoklubi / Esperantoklubo de Iisalmi, (Onni Kauppinen) Uudispihantie 298, 74100 Iisalmi. ☎ 0500 813 530 onni.kauppinen@pp.inet.fi
- ♦ Jyväskylän Esperantokerro / Esperantoklubo de Jyväskylä (Kimmo Hannula) ☎ 050 329 8202 kimmo.hannula@creavit.fi, www.esperanto.fi/jyvaskyla
- ♦ Oulun esperantoseura / Esperanto-societo de Oulu ry (Aini Vääräniemi), Vääräjärventie 26 A, 93590 Vanhala www.esperanto.fi/oulu aini.esp@hotmail.com
- ♦ Salo Esperantoseura / Esperantoklubo de Salo (Matti Wallius) Eräpolku 1, 25130 Muurla matti.wallius@ebaana.net
- ♦ Esperantoseura Antaäin ry. / Esperanto-societo Antaäin, Satakunnankatu 30 C 6, 33210 Tampere. www.esperanto.fi/tampere (Jukka Laaksonen: jvaletto@kolumbus.fi) ☎ 050 5829 248)
- ♦ Turun Esperanto-yhdistys ry. / Esperanto-societo en Turku (Tiina Oittinen), Puutarhankatu 26 A 11, 20100 Turku. tiina.oittinen@pp.inet.fi
- ♦ Suomen opettajien esperantoyhdistys / Esperanto-Ligo de Finlandaj Instruistoj, (Sylvia Hämäläinen) F. E. Sillanpään katu 2 C 46, 33230 Tampere. sylvia.h@kolumbus.fi ☎ 050 321 4313. Tilinro: FI08 4450 2320 0836 06 HELSFIHH (445023-283606)
- ♦ Sokeiden esperanto-yhdistys Steleto. (Ritva Sabelli) Pietarinkatu 10 D 27, 00140 Helsinki. ☎ (09) 660 651 steleto@pp.inet.fi
- ♦ Suomen nuorten Esperantoliitto / Finnlanda Esperantista Junulara Organizo (FEJO) Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki. fejo@esperanto.fi. Tilinro: FI83 5630 0020 2136 06 OKOYFIHH (563000-2213606)

Jäsenyhdistysten jäsenet ovat automaattisesti Suomen Esperantoliiton jäseniä, yhdistykset hoitavat jäsenmaksut liittoon. Esperantolehden

hintaa jäsenille on 16 e tilattuna jäsenjärjestöjen kautta. Liittoon voi myös kuulua henkilöjäsenenä, jolloin jäsenmaksu on 20 e sisältäen Esperantolehden. Nino Runeberg -seuran jäsenmaksu on 40 e. Lisätietoja jäsenyhdistyksiltä ja liiton toimihenkilöiltä.

Lahdessa on esperantoharrastajien ryhmä, joka kokoontuu tarpeen mukaan. Lisätietoja saa Börje Erikssonilta (EAF:n hallituksen varajäsen). esperarto@phnet.fi.

Lappeenrannassa toimii aktiivinen esperanton harrastajien ryhmä. Lisätietoja: Jorma Toropainen, puh. 040 7510535, s-posti jormato35@gmail.com.

Aktiivisia harrastajia on myös mm. Hämeenlinnassa, Mikkelissä, Porissa, Raumalla ja Taivalkoskella. Paikkakuntien yhteyshenkilöistä saa tietoa Suomen Esperantoliitolta.

ESPERANTOLEHTI

ilmestyy vuonna
aperas dum la jaro

2013

Nro	Limdato	Aperas
2/2013	31.3.	en aprilo
3/2013	31.5.	en junio
4/2013	1.9.	en septembro
5/2013	15.11.	en decembro

Ilmoitushinnat ♦ Anonprezoj

Ulkopuoliset mainostajat /

Ekster membraro:	Jäsenet / Membroj:
1/1 sivu/paĝo 100 e	1/1 sivu/paĝo 50 e
1/2 sivua/paĝo 60 e	1/2 sivua/paĝo 30 e
1/4 sivua/paĝo 40 e	1/4 sivua/paĝo 20 e

Sendu la anoncojn aŭ rete al la redaktejo: eafgazeto@esperanto.fi aŭ poŝte al la oficejo: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu 15 C 65, 00530 Helsinki.



Itella Green

Invito al la 49-aj Baltiaj Tagoj en Litovio

**La Litova Esperanto-Asocio invitas de-
nove al la tradiciaj, internaciaj, ĉi-somere
49-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-49).**

Tempo: 6a – 14a julio 2013,
eblas jam alveni je la 5a julio.

La programo estas tradicia, t.e. somera univ-
ersitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literatu-
raj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, debatoj
pri la situacio kaj problemoj de la Esperanto-
movado en Baltiaj landoj, tradukista kurso, pe-
dagogia seminario, seminario de klubestroj kaj
aktivuloj, movada lernejo, scienc teknikaj kaj
fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj
aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj,
ekskursoj tra la urbo kaj aliaj apudaj vidindaĵoj,
diskutoj, forumoj, libroservo, interkona vespe-
ro, diservo, baza konatiĝo kun litova lingvo kaj
kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gaze-
tara konferenco, sportaj ludoj, oficiala malfer-
mo kaj fermo, adiaŭa vespero k.a..

Kie: En la orientlitovia urbo kaj regiona cent-
ro *Utena*, unu el la plej malnovaj loĝlokoj de
Litovio, kun 35000 loĝantoj kaj multegaj lagoj
ĉirkaŭe (inter ili: la plej profunda, la plej longa
kaj la plej ŝatata lagoj en Litovio).

Kunvenejo estos la moderne kaj bonege eki-

pita Kolegio de Ute-
na (pl. Utenio 2-4),
kie haveblas ankaŭ
2- ĝis 3-litaj studen-
taj ĉambroj kun kom-
muna duŝejo sur la
etaĝo. Pliaj eblecoj
videblas ĉe la turis-
ma informejo, www.utenainfo.lt.



Antaŭ kaj post BET-49 estas ebleco laŭ mo-
deraj prezoj aktive ripozi en proksimaj atkva-
litaj turismejoj kaj ripozejoj. Interesiĝantoj pri
tio bonvolu aparte peti informojn ĉe la Organiza
Komitato.

Ĝis la 31.03.2013 la aliĝo kostas por fin-
noj (kaj okcidentuloj) 120 lidojn, ekde la
01.04.2013 la kotizo kreskos j 30 lidoj. Infanoj,
lernantoj kaj studentoj ne pagas aliĝkotizon.
Unu eŭro egalas al 3,45 lidoj.

Por aliĝi necesas pleniĝi aliĝilon (ekz. de la
retejo de LEA) kaj sendi ĝin al Litova Esperan-
to-Asocio: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio.
Eblas aliĝi telefakse +370-37-228616 aŭ rete al
litova.ea@mail.lt. Samtempe pagu aliĝkotizon.

Pliaj informoj pri BET-49 troveblas ĉe [http://
www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET49](http://www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET49)

Laŭ la Organiza komitato

Seuraava numero ♦ Venonta numero

Seuraava numero ilmestyy huhtikuussa. Jutut 31.3.2013 mennessä toimitukseen. La venonta numero ape-
ros en aprilo. Artikoloj ĝis 31.3.2013 al la redakcio. Osoite/adreso: Esperantolehti/EAF, Siltasaarenkatu
15 C 65, 00530 Helsinki, s-posti/rete: eafgazeto@esperanto.fi.

Kopio Niini, Tampere 2013